# *Kuba prezidento gratulas gazetarlaboristojn*




Havano, mar 14 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel gratulis ?i-marde la laboristojn de la gazetaro, kiuj celebras sian tagon koincide kun la 131-a datreveno de la gazeto Patrio kreita de la nacia heroo kuba José Martí.

Per sia konto de Tvitero, la ?tatestro esprimis: Feli?an tagon de la Kuba Gazetaro, kiu ver?as lumon sur la neefikon kaj bremsojn al evoluo, kiu agnoskas la klopodojn kaj rezultojn, kiu honorigas la Patrolandon ?iutage per etiko kaj vero kiel principoj.

Dum tiu ?i tago la ?urnalista organizo UPEC  plenumos plurajn agojn kiel la transdono de la premioj naciaj de jurnalismo José Martí al kvin personecoj de la sektoro, kaj la premion Juan Gualberto  Gómez pro la jara laboro en diversaj kategorioj.

La 14-an de marto 1892 José Martí fondis en la urbo Nov-Jorko la gazeton Patrio, kiu kiel samkiel li asertis, havis kiel celon “unuigi kaj ami, kaj vivi en la pasio de vero”, kaj unuiginte ?irka? la ideo de la

kuba kaj portorika sendependeco, ?i fari?is modelo por la kuba gazetaro.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/316568-kuba-prezidento-gratulas-gazetarlaboristojn

Radio Habana Cuba